

# La Pastreco

Kio estas la pastreco?

Nia Ĉiela Patro havas grandan povon. Tiu ĉi povo nomiĝas la pastreco. Per tiu ĉi povo, la ĉieloj kaj la tero estis kreitaj. Per tiu povo la universo subteniĝas en perfekta ordo.

Nia Ĉiela Patro dividas sian patrecon kun siaj infanoj sur la tero. Tiuj, kiuj estas ordinitaj al tiu povo havas la aŭtoritaton por agi en lia nomo kaj por fari lian laboron. (Doktrinoj kaj Interkonsentoj (DI) 121:36).

Kial ni bezonas la pastrecon sur la tero?

Ni devas havi pastrecon aŭtoritaton por agi en la nomo de Dio, por efektiviĝi la sanktajn ordinojn de la evangelio, tiaj kiaj bapto, konfirmacio, administrado de la sakramento kaj templan geedziĝon. Se homo ne havas la pastrecon, eĉ se li estas sincera, la Sinjoro ne agnoskas ordinojn efektivigatajn de li (Mateo 7:21-23). Sur la tero, tiuj gravaj ordinoj devas esti efektivigataj de homoj, kiuj posedas pastrecon.

Homoj nepre bezonas la pastrecon por prezidi en la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, kaj direkti la laboron de la Eklezio en ĉiuj mondpartoj. Kiam Kristo vivis sur la tero, li mem elektis siajn apostolojn kaj ordinis ilin por ke ili povu gvidi sian eklezion. Li donis al ili la povon kaj aŭtoritaton de la pastreco por agi en lia [\*\*\* sia] nomo. (Marko 3:13-15, Johano 15:16).

Alia kialo pro kio la pastreco estas nepre necesa sur la tero estas, ke ni povas tiamaniere kompreni la volon de la Sinjoro kaj realigi liajn dezirojn. Dio rivelacias sian volon al sia aŭtoritatigita reprezentanto de la pastreco sur la tero; al la profeto. La profeto, kiu estas Prezidento de la Eklezio, servas kiel la proparolanto de Dio al ĉiuj membroj de la Eklezio kaj al ĉiuj homoj sur la tero.

Kiamaniere homoj ricevas la pastrecon?

La Sinjoro preparis ordoplenan rimedon por sia pastreco, kiu devas esti transdonato al liaj filoj sur la tero. Inda viro de la Eklezio ricevas la pastrecon, per la surmetado de manoj, de tiuj, kiuj estas kun aŭtoritato proklami la evangelion kaj administri ĝiajn ordinojn. (kvina kredartikolo)

Temas pri la sama rimedo, laŭ kiu homoj ricevadis la pastrecon dum la antikva epoko, eĉ en la tempo de Moseo "Kaj neniu alprenas al si tiun honoron krom la vokado de Dio, tiel same kiel Aaron" (Hebreoj 5:4). Aaron ricevis la pastrecon el sia gvidanto en la pastreco, kiu estis la profeto Moseo (Eliro 28:1). Nur tiuj, kiuj havas la pastrecon povas ordini aliajn.

Homoj ne povas aĉeti kaj vendi la povon kaj aŭtoritaton de la pastreco, kaj ne povas preni tiun ĉi aŭtoritaton por si mem. En la Nova Testamento ni legas pri homo nomita Simono, kiu vivis kiam la apostoloj de Kristo estis la prezidaj gvidantoj en la pastreco super la eklezio. Simono konvertiĝis kaj baptiĝis al la Eklezio. Tial, ke li estis tre lerta magiisto, la popolo kredis, ke li havas la povon de Dio. Sed Simono ne havis la pastrecon kaj li sciis tion.

Simono sciis, ke la apostoloj kaj la aliaj gvidantoj en la pastreco de la Eklezio havas la veran povon de Dio. Li vidis ilin uzi sian [\*\*\* ilian] pastrecon por efektivi la laboron de la Sinjoro, kaj li ekdeziris tiun ĉi povon por si mem. Li faris oferton por aĉeti la pastrecon. Sed Petro, la ĉefa apostolo diris, "Via arĝentaĵo iru kun vi en pereon, ĉar vi pensis ricevi per mono la donacon de Dio" (Agoj 8:9-21).

Kiamaniere devas homoj uzi la pastrecon?

La pastreco devas esti uzata por beni la vivojn de la infanoj de nia Ĉiela Patro tie ĉi sur la tero. La posedantoj de la pastreco devas prezidi en amo kaj afableco. Ili ne devas perforte obeigi al si siajn familiojn kaj aliajn. La Sinjoro diris al ni, ke la povo de la pastreco ne devas esti regata alimaniere ol per virto. (DI [Doktrino kaj Interligoj] 121:36) Kiam ni provas uzi la pastrecon por malvirte gajni riĉaĵojn aŭ famon aŭ kian ajn alian egoistan celon, la efektiva povo de la pastreco ĉesas. (DI 121:41).

Se homo uzas la pastrecon per persvado, per pacienco, per ĝentileco kaj per humileco (DI 121:41), tiukaze la koncernulo povas efektivi multajn mirindajn aĵojn por sia familio kaj aliaj. Li povas bapti kaj konfirmacii, administri la sakramenton kaj beni la malsanulojn. Li povas doni pastrecajn benojn al siaj familianoj por kuraĝigi kaj ŝirmi ilin, kiam ili havas specialajn bezonojn. Li povas same helpi al aliaj familioj per tiuj ordinoj kaj benoj, kiam oni tion petas de li.

Kiaj benoj venas kiam ni inde uzas la pastrecon?

La Sinjoro promesis granajn benojn al tiuj, kiuj havas la veran pastrecon kaj uzas ĝin por beni aliulojn (DI 121:45-46). Unu el la grandaj profetoj de la lastaj tagoj, David O. McKay, promesis al ĉiuj, kiuj uzas la pastrecon en virto: "Li trovos sian vivon dolĉigita, sian percepton akriĝita por rapide distingi inter justeco kaj maljusteco, siajn sentojn korkaresemaj kaj kompatemaj, eĉ sian spiritan fortigita kaj brava en defendo de justeco; li trovos la pastrecon senĉesa fonto de feliĉo - puto de vivanta akvo ŝprucanta al eterna vivo. (David O. McKay, Instructor oktobro 1968).

Organizo de la pastreco

La Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tago estas regata de la pastreco. La pastreco, kiu estas ĉiam ligata kun la laboro de Dio daŭras en la Eklezio de Dio tra ĉiuj generacioj kaj estas sen komenco de tagoj kaj sen fino de jaroj (DI 84:17). Ĝi estas hodiaŭ

sur la tero.

Homoj junaj kaj maljunaj estas baptitaj en la Eklezion kaj kiam ili estas juĝataj indaj, ili estas ordinitaj al la pastreco. Estas donita al ili al aŭtoritato por agi en la nomo de la Sinjoro kaj efektiviĝi lian laboron sur la tero.

Du dividoj de pastreco

La pastreco estas dividita en du partoj. La Melkicedeka Pastreco kaj la Aarona Pastreco (DI 107). La pli alta pastreco estas la Melkicedeka Pastreco. Antikve, ĝi nomiĝis "La Sankta Pastreco laŭ la Ordo de la Filo de Dio." Sed la nomo estis ŝanĝita por eviti la tro oftan uzadon de la nomo de la Sinjoro. La Eklezio nomis la pastrecon "La Melkicedeka Pastreco" laŭ granda ĉefpastro, kiu vivis dum la epoko de Abraham (DI 107:2-4).

La malpli alta pastreco estas akcesoraĵo al la Melkicedeka Pastreco. Ĝi nomiĝas la Aarona Pastreco, ĉar ĝi estis transmetita al Aaron kaj al ties filoj tra ĉiuj iliaj generacioj. Tiuj, kiuj havas la Aaronan Pastrecon havas la aŭtoritaton administri la eksterajn ordinojn de fido, pento kaj bapto. (DI 107:13-14).

Tiuj, kiuj posedas la Melkicedekan Pastrecon havas la povon kaj aŭtoritaton gvidi la Eklezio kaj direkti la proklamadon de la evangelio en ĉiuj mondpartoj. Sub ties zorgo estas la tutaĵo de la spirita laboro de la Eklezio (DI 84:19-22). Ili direktas la laboron faratan en la temploj; ili prezidas kvartalojn (paroĥojn), branĉojn de la eklezio, palisojn kaj misiojn. Ili kuracas malsanulojn, benas bebojn, donas specialajn benojn al membroj de la Eklezio. La profeto vokita de la Sinjoro, la Prezidanto de la Eklezio, estas la prezidanta ĉefpastro super la Melkicedeka Pastreco (DI 107:65-57).

Ŝlosiloj de la pastreco

Estas diferenco inter pastreco kaj "ŝlosiloj" de la pastreco. Pastro en kvartalo havas sufiĉan povon por bapti, tamen li ekhavis la rajton efektiviĝi tiun ordinon antaŭ ol li fariĝis episkopo. La episkopo havas la "ŝosilojn", kiuj apartenas al administrado de la aferoj sub lia eklezia jurisdikcio. Tial li estas la persono, kiu povas ordoni al pastro bapti.

La prezidanto kaj profeto de la Eklezio havas la ŝlosilojn de la pastreco por administri en ĉiuj spiritaj kaj portempaj aferoj de la Eklezio. Estas lia rajto delegi prezidantojn de palisoj, episkopojn, patriarkojn kaj aliajn, kiuj havas la ŝosilojn apartenantajn al specialaj oficoj de diversaj geografiaj medioj. Prezidanto Jozefo F. Smith instruis la jenon:

"Ĉiu ajn viro ordinita al iu grado de la pastreco havas tiun aŭtoritaton delegitan al li. Sed estas nepre necese, ke ĉiu ajn ago efektivigita sub tiu aŭtoritato estu farita je la ĝusta tempo kaj loko, en la ĝusta maniero kaj laŭ la ĝusta ordo. La povo direkti tiujn ĉi laborojn konsistigas la ŝosilojn de la pastreco. (Doktrino de la Evangelio p. 136 Melvin R. Brooks, L.D.S. Reference Encyclopedia p. 393.)

## La oficoj kaj devoj de la Aarona Pastreco

Kiam la Aarona Pastreco estas transmetata al viro aŭ knabo, li estas ordinita al ofico de tiu ĉi pastreco. Oficoj de la pastreco nomiĝas "akcesoraĵoj" al la pastreco. (DI 84:29-30; 107:5) Ĉiu ajn ofico inkluzivas devojn kaj respondecojn, kiuj povas esti donitaj al tiuj, kiuj renkontiĝas en grupoj de posedantoj de la pastreco, nomitaj "kvorumoj." Ĉiu grupo aŭ kvorumo estas prezidata de grupgvidanto aŭ kvoruma prezidanto, kiu instruas la membrojn pri iliaj devoj kaj alvokas ilin plenumadi iliajn taskojn.

La oficoj de la Aarona Pastreco estas: diakono, instruisto, pastro kaj episkopo. Knaboj de dek du jaroj kutime ricevas la oficon de diakono. Je la aĝo de dek kvar jaroj ili fariĝas instruistoj kaj je la aĝo de dek ses, pastroj. Iuj viroj aliĝas al la Eklezio aŭ fariĝas aktivaj post la kutimaj aĝoj, kiam oni ricevas la oficojn de la pastreco. Ne gravas ilia aĝo. Ili ordinar komencas kiel diakonoj kaj povas ricevi pli altajn oficojn se ili estas indaj je tio.

### Diakono

Kiam knabo estas baptita kaj konfirmaciita kiel membro de la Eklezio kaj estas inda, li povas esti ordinita al la ofico de diakono kiam li havas dek du jarojn. Diakonoj estas kutime petataj disdoni la sakramenton al la membroj de la Eklezio, agi kiel pedelo, gardi eklezian konstruaĵon kaj terenojn en bona ordo, agi kiel mesaĝistoj por la pastrecaj gvidantoj kaj plenumi specialajn taskojn.

### Instruisto

Agnoskita kiel inda, knabo povas esti ordonita instruisto, atingante dek kvar jarojn aŭ pli. Instruisto, atingante dek kvar jarojn aŭ pli. Instruistoj havas ĉiujn devojn, rajtojn kaj povojn de la ofico de diakono plus aldonajn respondecojn. Instruistoj en la Aarona Pastreco devas helpi membrojn de la Eklezio vivi laŭ la ordonoj de Dio (DI 20:53-59). Por helpi plenumi tiun respondecon, ili estas kutime alvokataj labori kiel hejminstruistoj. Ili vizitas la hejmojn de membroj de la Eklezio kaj kuraĝigas ilin vivi laŭ la principoj de la evangelio. Oni ordonis al ili instrui la verojn de la evangelio el la Sanktaj Skriboj (DI 42:12). Instruistoj ankaŭ preparas la panon kaj akvon por la sakramenta servo.

### Pastro

Pastroj havas ĉiujn devojn, rajtojn kaj povojn de la oficoj de diakono kaj instruisto plus aldonaj oficoj. (DI 20:46-51). Pastro povas bapti. Li povas ankaŭ administri la sakramenton. Li povas ordini aliajn pastrojn, instruistojn kaj diakonojn. Pastro povas prezidi kunvenojn kiam forestas iu, kiu posedas la Melkicedekan Pastrecon. Lia tasko konsistas en tio, ke li devas proklami la evangelion al tiuj, kiuj troviĝas en lia medio. Knabo devas esti almenaŭ dek-ses-jara antaŭ ol esti ordinita pastro.

## Episkopo

Episkopo estas ordinita kaj apartigita por prezidi la Aaronan pastrecon en kvartalo de la Eklezio. Li estas la prezidanto de la kворumo de pastroj (DI 107:87-88). Kiam li agas en sia ofico de la Aarona Pastreco, la episkopo prizorgas antaŭ ĉio, portempajn aferojn, kiel konstruaĵojn, ricevadon de dekonaĵoj, kaj ofertojn kaj preparadon de buĝetoj (DI 107:68).

Episkopo, tamen estas same ordinita kiel ĉefpastro kaj li rajtas prezidi ĉiujn aferojn de la kvartalo kaj ĉiujn membrojn de la kvartalo (DI 107:74). Lia rajto konsistas en tio, ke li havas la donon distingi bonon de malbono. Tiu ĉi estas la povo distingi aŭ ekkoni ĉiujn spiritajn donojn "por ke forestu inter ni tiuj, kiuj ne konfesas Dion kaj eĉ tiuj, kiuj ne estas de Dio" (DI 46:27).

La oficoj kaj devoj de la Melkicedeka Pastreco estas: aĝulo (aŭ eldero), sepdeko, ĉefpastro, patriarko kaj apostolo.

## Aĝulo

Aĝulo estas alvokitaj por instrui, klerigi, admoni, bapti kaj prizorgi super la Eklezio (DI 20:12). Ĉiuj, kiuj havas la Melkicedekan Pastrecon estas Aĝuloj. Ili havas la aŭtoritaton transdoni la donacon de la Sankta Spirito per la surmeto de manoj (DI 20:43). Aĝuloj devas prezidi kunvenojn de la Eklezio, kiel ili estas gvidataj de la Sankta Spirito (DI 20:46; 46:2). Aĝuloj povas administri benojn al la malsanuloj (DI 42:44). Ili havas la ordonon beni malgrandajn infanojn (DI 20:70). Aĝuloj povas prezidi ekleziajn kunvenojn kiam forestas ĉefpastro.

## Sepdeko

Sepdeko havas specialan alvokon proklami la evangelion (DI 107:25). En la Eklezio, la sepdekoj estas alvokitaj esti misiistoj por ne-membroj.

## Ĉefpastro

Ĉefpastro estas rajtigita funkcii en la Eklezio kaj prizorgi spiritajn aferojn (DI 107:10-12). Li havas la aŭtoritaton funkcii en ĉiuj malplialtaj oficoj (DI 68:19). Prezidantoj de palisoj, misioj, altaj konsilantoj, membroj de episkopecoj kaj aliaj gvidantoj de la Eklezio estas ordinitaj kiel ĉefpastroj.

## Patriarko

Patriarko estas alvokitaj kaj ordinitaj de la Apostoloj de la Eklezio por ke ili donadu specialajn patriarkajn benojn al membroj de la Eklezio en la diversaj palisoj. Tiuj benoj donas al ni komprenon pri niaj personaj alvokoj ĉi tie sur la tero. Ili estas la vorto de la Sinjoro persone direktita al ni. Patriarko estas ordinitaj kiel ĉefpastroj (DI 107:39-56).

## Apostolo

Apostolo estas speciala atestanto de Jesuo Kristo al la tuta mondo (DI 107:23). La Apostoloj administras la aferojn de la Eklezio tra la tuta mondo. Tiuj, kiuj estas ordinitaj al ofico de apostolo en la Melkicedeka Pastreco estas speciale alvokitaj kiel membroj de la Konsilantaro de Dek Du Apostoloj. Al ĉiu ajn el ili estas donitaj la ŝlosiloj de la regno de Dio sur la tero. Nur la Prezidanto de la Eklezio, kiu estas la plej malnova apostolo aktive, aplikas ĉiujn ŝlosilojn. La aliaj agas sub lia direkto.

## La kvorumoj de la Melkicedeka Pastreco

La Sinjoro instruis, ke tiuj, kiuj posedas la pastrecon estu organizitaj en kvorumoj. Kvorumo konsistas el fratoj havantaj la samas oficon en la pastreco. Ekzistas en la palisoj de la Ciono (la Eklezio) la sekvantaj kvorumoj de la Melkicedeka Pastreco.

## La Kvorumo de Aĝuloj

La Kvorumo de Aĝulo estas establita por konstanta servado; malgraŭ tio, ke ili povas vojaĝi, sed ili estas ordinitaj por esti konstantaj, ne forlasantaj sian loĝlokon (DI 134:137). Ili efektivas la plej grandan parton de sia laboro proksime de siaj hejmoj (DI 124:137). Tiu ĉi kvorumo konsistu el 96 Aĝuloj, sub la prezidanteco de kvorumo. La prezidanteco de kvorumo estas alvokita de la prezidanto de paliso. Viroj, kiuj ankoraŭ ne posedas la Melkicedekan Pastrecon nomiĝas "Estontaj Aĝuloj." Ili asociiĝas al la kvorumo de Aĝuloj.

## La Kvorumo de Sepdekoj

"La Kvorumoj de Sepdekoj estas establitaj por esti Vojaĝantaj Aĝuloj, por ke ili portu ateston pri mia nomo al la tuta mondo." (DI 124:139). Tiu ĉi kvorumo enhavas sepdek fratojn. Ili devas esti prezidataj de sep prezidantoj. Ilia laboro estas misia laboro.

## La Kvorumo de Ĉefpastroj

Ĉiu ajn kvorumo inkluzivas ĉiujn ĉefpastrojn konstante loĝantajn en la limoj de la paliso, entenanta patriarkon kaj episkopojn. La prezidento de paliso kaj ties konsilantoj konsistigas la prezidantecon de tiu ĉi kvorumo.

## La kvorumoj de la Aarona Pastreco

Estas tri kvorumoj de la Aarona Pastreco:

1. La Kvorumo de Diakonoj, kiu konsistas el dek du diakonoj (DI 107:85). La prezidanteco de la Kvorumo de Diakonoj estas alvokata de la episkopo, el inter ĝiaj membroj.
2. La Kvorumo de Instruistoj, kiu konsistas el 24 membroj (DI 107:87). La prezidanteco de la Kvorumo de Instruistoj estas alvokata de la episkopo el inter ĝiaj membroj.

3. La Kvorumo de Pastroj, kiu konsistas el 48 pastroj (DI 107:88). Ĝi estas prezidata de la episkopo de la kvartalo, al kiu apartenas tiu ĉi kvorumo. La episkopo estas ĉefpastro kaj tiamaniere ankaŭ li apartenas al la kvorumo de ĉefpastroj.

Kiam ajn la nombro specifita por kvorumo superiĝas, la kvorumo devas esti dividita.

Ĉiu ajn, kiu havas la pastrecon, apartenu al kvorumo. Ĝi estas sankta privilegio, kiu akompanas la donacon de la pastreco. Tiuj, kiuj posedas la pastrecon, devas esti, kiel oni atendas, membroj de kvorumo. (Boyd K. Packer, "La Kvorumo" en A Royal Priesthood, Melchizedek Priesthood Personal Study Guide, 1975-76 p. 131-136.)

Ordinita al la pastreco, viro aŭ knabo aŭtomate fariĝas membro de kvorumo de pastreco. Ekde tiu ĉi momento en lia vivo oni atendas, ke li fariĝos membro en kvorumo de la pastreco konforme al sia ofico.

Se kvorumo de pastreco funkcias konvene, la membroj de la respektiva kvorumo estas kuraĝigataj, benataj kaj instruataj pri la evangelio per siaj gvidantoj kaj subtenataj de kunmembroj. Eĉ se iu viro povas esti alvokita kaj ellasita de la ekleziaj funkcioj, kiel ekzemple instruisto, episkopo, alta konsilanto aŭ prezidanto de paliso, lia membreco en lia kvorumo ne ŝanĝiĝas. Posedo de la pastreco estas konsiderata kiel sankta privilegio.